# *La kuba ministro pri ekstera komerco Rodrigo Malmierca finis sian viziton en Usono*



La oficiala laborvizito de la kuba ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca, fini?is per kunsido en Washington kun la guberniestro de la usona ?tato Virginia, Terry MacAuliffe, kiel fermo de sia laborvizito en tiu lando.

Malmierca akceptis la funkciulon kune kun la ambasadoro José Ramón Cabañas, en la diplomatia sidejo de la insulo.

MacAuliffe vizitis Havanon la pasintan monaton, kie li dialogis kun Malmierca pri la negoceblecoj en la kariba lando, en la kunteksto de la proksimi?o inter la du registaroj kiel anoncite en decembro de 2014.

La guberniestro de Virginia alvokis elimini la sie?on ekonomian, komercan kaj financan kontra? la insulo.

Per la nuna dialogo en Washington, Malmierca finis intensan laboragendon en la usona teritorio, kiu inkluzivis eventojn en la Komerca ?ambro, en la departemento pri komerco kaj en la instituto usona de la paco.

La kuba ministro kaj kelkaj akompanantoj estis akceptitaj de la ?tata sekretario, John Kerry, kelkajn horojn post la anonco de la vizito de la prezidento Barack Obama al Kubo la 21-an kaj 22án de marto.

Dum siaj prezentoj anta? funkciuloj, negocistoj, akademianoj kaj ?urnalistoj, Malmierca rekonfirmis la volon de Havano avanci al normaligo de la reciprokaj rilatoj kaj insistis pri tio ke la sie?o usona estas la ?efa obstaklo en la plenumo de tiu celo, same dezirata de la nuna administracio usona.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/84647-la-kuba-ministro-pri-ekstera-komerco-rodrigo-malmierca-finis-sian-viziton-en-usono

**Radio Habana Cuba**